château du
Haut-Kœnigsbourg

Bien plus qu'un monument



# Historio

## De la Hohenstaufen ĝis hodiaŭ

**Frederiko de Hohenstaufen,** kromnomita «la unuokula», duko de Ŝvabio, probable komprenis la strategian gravecon de **la monto de Stophanberch** (alteco 755 m, kiu etendiĝas orienten orte al la ebenaĵo, ĉar tiun kastelon oni mencias unuafoje en la tempo kiam li reĝis (12a jarcento).

Tiu roka sprono troviĝis ĉe la kruciĝo de gravaj ekonomiaj vojoj. La vojo de tritiko kaj vino (de nordo al sudo) kaj la vojo de salo kaj arĝento (de okcidento al oriento).

La familio **Habsburg** akiris la kastelon kaj donacis ĝin al la familio Tierstein kiel feŭdon en 1479. Tiuj ĉi rekonstruis ĝin kaj aldonis defendan sistemon taŭgan kontraŭ kanonoj.


Dum la tridekjara milito, **la kapitano Philippe de Liechtenau** rezistis pli ol unu monaton kontraŭ la atakoj de la Svedoj, kiuj finfine rabis kaj bruligis la kastelon. Ĝi poste estis forlasita dum du jarcentoj kaj duono.

En 1865, la kastelon kaj la ĉirkaŭan arbaron ekposedis la urbo de **Sélestat,** kiu donacis la bone konservitajn ruinojn al la germana imperiestro **Vilhelmo la dua de Hohenzollern** en 1899 (Alzaco estis sub regado de germana administracio ekde 1871).

**Vilhelmo la dua** renovigis la kastelon fare de la arkitekto **Bodo Ebhardt** inter 1900 kaj 1908.

Finaj laboroj kaj aĉeto de laŭepokaj kolektoj daŭris ĝis 1918.

Per la **traktato de Versailles** (1919), Francio ricevis la posedaĵojn de la germana krono kaj inter ili la kastelon Haut-Koenigsbourg.




La ĉi supraj **numeroj** kongruas kun tiuj de la mapo kaj de la aŭskult-ĉiĉeronilo.

# Sekvu la ĉiĉeronon


Post eniro tra la **pordo 10** kun blazono de la familio Tierstein, oni rimarkas dekstre ĉirkaŭmuron maldikan (15a-20a jarcento) kaj maldekstre la sudan loĝejon sur sia monta sprono (12a-20a jarcento).
Post la **herso 20,** oni eniras en la **birdokorton 30** kun dekstraflanke la ĉevalejo kaj ĉiuj konstruaĵoj, kiuj provizas ĉiajn necesaĵojn al la kastelo. En la mezo staras kopio de fontano de la 15a jarcento el la vilaĝo Eguisheim.
La nura ireblo al la loĝejo estas per la turo, kaj poste per **ŝtuparo 40** protektita de embrazuroj. Tiu spaca aranĝo devigis la atakantojn paŝi sub la embrazuroj kiam ili supreniris la deklivon. La pordo kaj la levponto super la fosaĵo estas la lastaj obstakloj antaŭ la loĝejo.

## La korto

La **puto 50** profunda je 62 metroj estis fortikigita por ke artileria atako ne povu disigi ĝin disde la loĝejo. La galerio ebligas aliri al la **vinkelo 60** kies longeco indikas la larĝon de la monta sprono sur kiu staras la kastelo.
En la **interna korto 80,** oni rekonstruis la sudajn lignajn galeriojn sur la ekzistantaj apogŝtonoj. **La kuirejo 82,** en la norda loĝejo, kun lavkuvo kaj du kamenoj ankoraŭ ekzistis antaŭ la restaŭrado.
La multangula ŝtuparo kondukas al la ĉefturo kaj al la norda kaj suda helicaj ŝtuparoj, kiuj kondukas al la ĉambroj.

## La dua etaĝo

Ĉe la dua etaĝo de la **norda loĝejo 90,** la murpaneloj provizas pli bonan izolitecon. Benkofenestro ebligas profiti la naturan lumon.
La hejtoforno enhavas du gisajn platojn trovitajn dum la esploroj.




En la **okcidenta loĝejo 100,** ĉe la plafono de la imperiestra ĉambro, figura aglo kaj blazonoj montras la politikecon de tiu ĉambro. Pentris la freskojn[3] Leo Schnug. La fundo de tiu ĉambro, ankaŭ nomita festoĉambro, enhavas elstaran podion, kiu montras la altecon de la originalaj ĉambroj.

La meblaro de la **lorena ĉambro 110** venis el tiu provinco dank'al donaco al la imperiestro.

Per la helica ŝtuparo de la **suda loĝejo 130** oni iras sur la podion de la kapelo.

Apude, la apartamentoj estas la plej komfortaj de la kastelo, ĉar ili estas sud-orientitaj kaj havas necesejojn.

Oni povas eniri tiujn ĉambrojn laŭvice aŭ laŭvole per la ekstera galerio.

Kopioj de trovitaj kaheloj dum la esploroj konsistigas la flavan ceramikan hejtofornon.

## La unua etaĝo

Per helica ŝtuparo oni revenas al la malsupra etaĝo kie oni retrovas la samajn ĉambrojn kiel supre. Oni poste alvenas al la **kapelo 120** kun sia elstara podio kaj flanka malfermo por bonvenigi pliajn preĝantojn.


Post la kapelo, oni eniras en la **ĉambron de la ĉasaj trofeoj 150.**

En al **armiltenejo 160** estas prezentitaj diversaj halebardoj, spadoj, arbalestoj kaj ŝirmarmiloj kaj la kopio de impona verda lakita ceramika hejtoforno kun varmiga seĝo.

Levponto superas la fosaĵon, kiu apartigas la okcidentan loĝejon disde la **ĝardeno 180.**

La spuroj de pordoj kaj fenestroj atestas pri la konstruaĵoj ekzistintaj pli frue ol la ĝardeno de la 16a jarcento.

[3] **Fresko:** Pentraĵo per akvaj koloriloj sur freŝa stukaĵo de muro.




## La granda bastiono

La montokresto ebligis al la atakantoj proksimigi siajn kanonojn el okcidento. Pro tiu teren-situacia malforto, oni konstruis la **grandan bastionon 190** por uzi kiel ŝirmŝildon kaj protekti la loĝejon.
Post la ŝtuparo, levponto kondukas al la artileria podio.
En la monumenta suda turo, la aperturoj liveras mirindan videblon al la Vogezoj kaj la ebenaĵo.
El la **norda turo** de la granda bastiono, oni malkovras du kastelojn sur la apudaj pintoj : l'Ortenburg kaj la Frankenburg. Oni ankaŭ ekvidas la valojn, kiujn la komercistoj uzis por transporti siajn varojn. Tiel oni perfekte komprenas la strategian lokon de la kastelo. Sur la artileria podio, kopioj de kanonoj montras la evoluon de artilerio inter la 15a kaj 17a jarcento.
Malsuprenirante, oni trairas kazematojn kaj alvenas en la **nordajn areojn inter la muroj 210** per moderna ŝtuparo. Randas ĝin maldekstre la ĉirkaŭmuro kun sia kovrita rondovojo kaj dekstre la muroj de la interna ĝardeno starantaj sur la roko. Tie, oni rimarkas tri latrinojn[4] kaj la elfluejon de la kuirejo.
Pilastro apogas la loĝejon kaj la ĉefturon ĉar ili emis fendiĝi. De tie, admiru la ĉefturon, kiu estis ĉiam kvadrata, kaj kies supera parto estis detruita dum la 16a jarcento po 12 metroj. La arkitekto restaŭris ĝin komence de la 20a jarcento.
Reen en la birdokorto, vidu la forĝejon ĉe via dekstra flanko, kie oni instalis restoracion en 1905.

[4] **Latrino:** Plej simpla necesejo kun necesseĝo aŭ nur foso en la planko.






# Arkitekturo

## Simbolo de la ĝermana potenco

La impreson pri potenco radiatan de la kastelo Haut-Koenigsbourg kaŭzas tiom ĝia vasteco, 1,5 hektaroj vasta, kiom ĝia **etaĝigo de sabloŝtonaj masoj.** Tri epokoj markis ĝian konstruon. De la 12a jarcento ĝis la unua duono de la 14a jarcento, kiam pluraj okupantoj dividis la kastelon inter si.

Ekde 1479, **oni rekonstruis por adaptiĝi al la artileria evoluo** per ekstera ĉirkaŭmuro lokita ĉe la dekliva klin-ŝanĝiĝo por malebligi alproksimiĝon de la malamikaj kanonoj, kaj per artileria bastiono kaj turoj kun dikaj muroj. Ankaŭ la loĝejon oni rearanĝis per ortaj fenestroj, korbelfenestroj[2] ktp. Pro relative bona stato, la ruinoj estis klasitaj historia monumento en 1862.

La komenco de la 20a jarcento spertas la renaskiĝon de la kastelo de la 15a jarcento post pli ol 250 jaroj da forlasado.

La arkitekto Bodo Ebhardt, kiu havis pasion pri mezepoko kaj fortikaĵoj, estris la renovigon de la Haut-Koenigsbourg science kaj metodike. En 1900, la plu starantaj muroj ofte atingis la alton de la embrazuroj, kaj volboj estis parte konservitaj. Tiel Bodo Ebhardt sukcesis reaspektigi laŭ formoj de la 15a kaj 16a jarcentoj. Nur kelkajn plej altajn partojn kaj tegmentojn li devis elpensi. Tiuj rekreoj verŝajne naskis la multnombrajn kverelojn, ekzemple pri la kvanto da kovritaj rondovojoj aŭ la ĉefturo.

Malgraŭ tio, la nuntempa Haut-Koenigsbourg bone respegulas la fortikajn kastelojn de la 15a kaj 16a jarcentoj starintaj en la rejna baseno.

[2] **Korbelfenestro:** Ĉiuflanka fenestreto orta al la ĉefa fenestro

# La restaŭrado[1]

La nuntempa kastelo estas rezulto de renovigo per detalema diligento dum la komenco de la 20a jarcento, fare de la arkitekto **Bodo Ebhardt** sub la gvidado de la imperiestro **Vilhelmo la dua de Hohenzollern,** kiu deziris ke la kastelo fariĝu ne imperia loĝejo sed muzeo pri mezepoko.
Vilhelmo la dua ankaŭ volis krei simbolon de la restarigita imperio kaj de la ĝermana pasinteco de Alzaco.
Bodo Ebhardt fondis sian rekonstruon sur precizaj mezuroj de la ruinoj, sur detalaj fotoj kaj sur ampleksaj arkeologia, historia kaj arkitektura esploroj. Li tamen respektis la ankoraŭ videblajn romanikajn spurojn. Li longe studis dokumentojn kaj vizitis multajn fortikajn kastelojn en Eŭropo.
El tiuj ĉiuj elementoj, Bodo Ebhardt proponis sian rekonstruan projekton al Vilhelmo la dua kiu konsentis.
Tiu ĉi lasta vizitis la konstruejon ĉiujare por konstati la evoluon de la laboro.
En la festoĉambro, li detruigis la plafonon por havi pli imponan ĉambron.
Tamen, kelkajn kritikojn oni lanĉis pri la laboro de la arkitekto pro la deklivo kaj la abunda uzo de tegoloj sur la tegmentoj, la rekonstruo de ventmuelilo anstataŭ brake pelata muelilo.
Oni aĉetis la meblojn kaj la armilojn komence de la 20a jarcento por **ilustri la vivon kaj la evoluon de la armiloj** de la fino de la mezepoko ĝis la tridekjara milito (1618-1648).
La maloftaj kopioj (inkluzive du kofrojn kaj unu hejtofornon) estis donacitaj al la kastelo, ĉar ili ebligas elvoki elstarajn verkojn.

[1] **Restaŭri:** ripari kaj remeti en la originan staton

Por ekscii pli:
**LE HAUT-KŒNIGSBOURG** - Roger Lehni - Ouest France/CNMHS 1996
**LE HAUT-KŒNIGSBOURG** - Éditions Schnell et Steiner GmBH Regensburg 1994
**HAUT-KŒNIGSBOURG** - Connaissance des Arts, Hors série n° 88 1996
**LE HAUT-KŒNIGSBOURG MYTHES ET RÉALITÉ**
L. Baridon et N. Pinters - CNMHS/CNRS éditions 1998
**HAUT-KŒNIGSBOURG** - M. Waechter et V. Noto Campanella - Éditions Pierron 1999

2019 v.1 - Photos : Serge Lohner - CD67.

**Château du Haut-Kœnigsbourg**
F-67600 Orschwiller
tél. +33 (0)3 69 33 25 00
fax +33 (0)3 69 33 25 01
haut-koenigsbourg@bas-rhin.fr
www.haut-koenigsbourg.fr

ALSACE | CONSEIL DÉPARTEMENTAL BAS-RHIN